

# Repe, Ritme, Sone...



Tone

[www.myspace.com/toneritme](http://www.myspace.com/toneritme)  
[toneritme@hotmail.com](mailto:toneritme@hotmail.com)

## NOVA KANTO

Teksto: Aleksandras Dambrauskas Dombrowski (pseŭdonimo: Adomas Jakštas) kaj Tone

---

---

Mil naŭcent kvin. Francio.  
La revo de la knabo el Bjalistoko fariĝis realo.  
Nun, ĉiuj personoj de la mondo povas saluti unu la alian.  
Jen Esperanto. Vivanta lingvo!

Veke vibru, veke vibru,  
Veke vibru verda voko!

Mil okcent kvindek naŭ  
Alvenis homo al la mondo kvazaŭ  
Li estus sendita por tasko misiista  
Altkvalita. Sur la tero infinita  
Dekkvina de decembro estis la dato  
Bjalistoko, pola urbeto, la kandidato  
Por ricevi la stafeton. La lingvan profeton  
Kiu ŝanĝus la mondon sen uzi bajoneton  
Lazaro Ludoviko Zamenhof  
Estis la nomo de la homo  
kiu kreis idiomon por forigi lingvan fantomon.

*Esperanto, estas nova kanto  
Mia kaj via. La Lingvo Internacia.*

Komenciĝis, do, la revolucio  
Kiu alportus nur bonon al civilizacio  
Esperanto ĉiuloken senhalte iras  
Simpatianton tra la mondo ĝi akiras  
Nekredebla akcepto. Ĉu eble mistika? Ne nur.  
Sed ankaŭ efika, praktika, komunika  
Ĉar la parolo flekseble kaj gracie fluas  
Tute libere, ĝi evoluas vere.  
Esperanto estas uzata proze aŭ poezie  
En ĉiuj rilatoj kaj alie.  
Interprete, interrete ankaŭ ĝi utilas  
Ĝi facilas, ni babilas.  
Kaj ĝia povo, kompreneble, ja furoras  
Pro tio Esperanto multe valoras  
Do!...Dehaku. Do!... Dehaku. Do!...  
Dehaku se vi povas baobabon.  
Dehaku se vi povas la revon de l' knabo  
El Bjalistoko. Kruda epoko. Plena je moko.  
La provoko, sufoko. Humila bloko. Patra ŝoko.  
Monda reciproko. Forta voko, en ĉiu loko. Jes!!!

*Esperanto, estas nova kanto  
Mia kaj via. La Lingvo Internacia.*

**Tiu parto estis verkita de la litova pastro, Aleksandras Dambrauskas Dombrowski (1860-1938):**

Eksonu nova kanto  
Pri la lingvo Esperanto,  
Pri ligil' internacia,  
Revo nia, amo nia!  
Kreitaj' la plej mirinda  
Vere estas ĝi laŭdinda  
De verkistoj, de poetoj,  
En poemoj kaj odetoj,  
Pli ol tondro de bataloj,  
Pli ol dolĉaj najtingaloj,  
Pli ol belaj aktorinoj,  
Pli ol fajfoj de maŝinoj,  
Pli ol oro la plej brila,  
Pli ol gloro senutila,  
Pli ol ĉiu, pli ol ĉio,  
Krom la amo kaj la Dio.  
Dum venonta la centjaro,  
Sciu esperantistaro,  
En Eŭropo, Ameriko,  
En Azio kaj Afriko,  
Kie ajn vi veturados  
Esperanton vi trovados,  
Sur la strato, en vagono,  
En hotelo, en salono  
Kaj eĉ en privata domo  
Ĝin parolos ĉiu homo:  
Laboristo, profesoro,  
Kaj juĝisto, kaj doktoro,  
Kaj hebreo, kaj kristano,  
Kaj litovo kaj japano, -  
Kaj pereos la plendato:  
"Mi vin ne komprenas, frato".  
Por ke venu tiu horo -  
Kune fratoj, al laboro!  
Jen per kanto, jen per vorto,  
Jen agante ĝis la morto,  
Servu ni al la afero,  
La plej bela sur la tero,  
Gardu ĝin de la forgeso  
Per parolo en la preso;  
Iru kiel apostoloj  
Ĝin prediki por popoloj,  
Kaj eksonu nia voko  
Sur la ter' en ĉiu loko,  
En vilaĝoj, en urbetoj,  
En lernejoj, en gazetoj,  
Kaj servantajn al la vero  
Nin fortigu la Espero.

*Esperanto, estas nova kanto  
Mia kaj via. La Lingvo Internacia.*

*Repe, Ritme, Sone / al ĉiuj mi salutas*  
*Repe, Ritme, Sone / estu bonvenaj*  
*Repe, Ritme, Sone / mi debutas*  
*Repe, Ritme, Sone / estu koroj ĝuplenaj...*

Estu koroj ĝuplenaj, la etoso estas unika  
spirita atmosfero por la repo lirika  
poezio romantika  
plena de pasio  
kontentigo de la sento kaj la fantazio  
ni preferu nun brilecon kaj koloron  
ni esprimu nun belecon kaj la gloron...  
de la "ni"...  
plenaj de ni mem, plenaj de energi'  
plenaj de sukceso, plenaj de progreso  
Venu do!  
Venu repe, venu ritme, venu sone...  
ĉar la vivo ne estas longa, ni profitu ĝin pli bone  
Repe, ritme, sone...  
ke tiu repo, en la mondo, sonu ritme, ĉie,  
sonu ĉio kio taŭgas, manifestacie  
dolĉe sonu, sonu laŭte, la tamburoj, la flutoj  
violono kaj trompetoj sonu, al la aŭskultoj  
sonu ĵazo, sonu bluso, sonu funkco, sonu roko  
en la moderna, en la nuntempa,  
ankaŭ en estonta epoko  
sonu la moneroj, sonu la tintiloj  
sonu al la oreloj ankaŭ la jubiloj...  
Tra jarmiloj...  
sonu ĝemoj, sonu krioj de la plej pura ĝojo  
en la domo, en fabriko, sur la strato, sur la vojo  
ankaŭ sonu aervibroj  
elegante la kolibroj  
sonu voĉo de l' naturo  
de la maro, la murmuro  
nia kanto en la mondo, sonu belefekte  
sonu daŭre, sonu intense, plejperfekte  
sonu ĉarme, forte, efike,  
sonu agrable la pardonpetoj  
sonu juste, firmdecide, sonu en ĉiuj societoj  
niaj deziroj, volo, sonu impone...  
plenumiĝu niaj revoj, ja komplete, ne duone...  
Repe, ritme, sone...

*Repe, Ritme, Sone / al ĉiuj mi salutas*  
*Repe, Ritme, Sone / estu bonvenaj*  
*Repe, Ritme, Sone / mi debutas*  
*Repe, Ritme, Sone / estu koroj ĝuplenaj...*

Venu repe, ritme, sone, kante  
Repe, ritme, soni konstante.  
Jes! Venu! Repe, ritme, sone...  
Repe, ritme, sone ni kontraŭ tuta mondon  
Ni infektu la mensojn per la sono la plej bona.  
Senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras  
Nia sono ĉiopovas, nia sono furoras  
Sonu plue, flue  
Sen kielo, kialo  
Senintence, potence  
Sen prokrasto, sen hasto.  
Hiphopo senbara.  
Magie forte inspirita, potenca, sorĉa kaj rara...  
Ni ricevu la agrablon kaj la ruĝon de l' plezur'...  
Kaj...  
Silentu en nia kor', ĉiu bru', ĉiu susur'.  
Kaj regu nur...  
Feliĉo necesa!!! Entuziasmo agresiva!!!  
Venu jes, venu kolose, venu, venu mojose,  
Venu jes, venu majeste, venu, venu feste..  
Kaj ni festu!... Kaj ni festu!...

Ni festu tiu momenton! Repe, Ritme, Sone!  
La deziron kaj kontenton! Repe, Ritme, Sone!  
Ni ĝuu tiun muzikon! Repe, Ritme, Sone!  
Ĝian dolĉon kaj efikon! Repe, Ritme, Sone!

Repe, ritme, sone tra la tempoj, tra l' eterno  
Ke Ni estu de la vivo ĉiam centro, ĉiam kerno  
Vole ne vole, forte, rigore, radiu ĉiam nia brilo!  
Eĉ iele-trapele, ribele, feliĉo estu nia akiro!  
Firmdecide nian spacon ni konkeru ĉampione  
Ĉu per mildo, delikate, se necese eĉ sprone...  
Repe, ritme, sone...

*Repe, Ritme, Sone / al ĉiuj mi salutas*  
*Repe, Ritme, Sone / estu bonvenaj*  
*Repe, Ritme, Sone / mi debutas*  
*Repe, Ritme, Sone / estu koroj ĝuplenaj...*

*Ho mia kor'!...*

el mia brusto nun, ne saltu for  
 Ĉar denove, mi volas senti la kareson de l' mano ŝia  
 promenante ameme sur korpo mia  
 ĝui kune alifoje, la dolĉan muzikecon de la vivo  
 kun deliro, admiro  
 entuziasma ravo,  
 kora pravo!  
 Denove ankaŭ la plezuron de momento emocia  
 la tutan senton poezian  
 denove kanti, denove ĝoji, denove ridi, ŝin ami  
 verki versojn al ŝi kaj al ŝi, ilin deklami  
 aŭdi kune koncerton de birdetoj  
 sub belo de l' ĉielo  
 sub luno kiu nin kisas  
 kaj porĉiame nin splisas  
*Ho, mia kor'*, mi memoras ke ni  
 lulataj de milda kanto, sur flortapiŝo,  
 dolĉe ripozis  
 trankvile dormis.  
 nur delikata nokta brizo tiumomente ŝtormis.  
 nek komenco, nek fino  
 nur eterno  
 en nia interno nur paradizo, feliĉo, ĝuo, ĝojo,  
 nur direkte al la koro eblis nun la vojo  
 kaj la vento, konsento, silento  
 ĉar magia la momento de la du  
 al kiuj la vivo estis senfina ĝu'!  
 ebriaj de la trankvilo, varmo, belo  
 ne estis mirrakonto, legendo, folkloro, fablo, fabelo  
 tiu nekonata, nedifina energio  
 tiu febro, korpanima revolucio  
 bonvena agonio. *Ho, mia kor'!...*

*Ho mia kor'*

*el mia brusto nun ne saltu for  
 ne batu, mia kor', maltrankvile  
 jam teni min ne povas mi facile  
 Ho, mia kor'!*

Ŝi restas tiel vivplena en mia memoro  
 Ŝi, la matena krepusko, la aŭroro  
 Ŝi, vekanta ĉiumomente vivplezuron  
 Ke mi ne agas malfidele al tiu amo, per Dio, mi faris  
 ĵuron!  
 Ho, Bela Nimfo! Linda kaj Brilanta Estulin'  
 Kiu per la ĉarma rideto, jes, sorĉis min  
 Ŝi ĉiam gaje loga, plaĉaspekta, pimpa  
 kvazaŭ venintus el Monto Olimpa  
 plena de viveco, brila, grandioza, rava  
 impona, majesta, supernatura, senlime grava  
 Ĉu diino venera? Ĉiopova? Supera? Eble.  
 ĉar ŝi, mistere, min katenas  
 mia amo ĝis nun al ŝi apartenas  
 Ho, ho, Forta Forto! Ripoziga komforto!

Estas ŝi la oazo kiu ĉesigas soifon  
 Estas ŝi kiu donas al vivo signifon  
 Ŝi, kompleta. Komforma. Precize ĝusta.  
 Rifuĝejo kaj konsolo por la flamo brusta  
 Estas ŝi balzamo por anima vundo  
 Firma kaj fekunda, fundamenta kaj favora fundo.  
 Aminundo!  
 Estas ŝi printempo kiu  
 en la ĝusta tempo  
 portas floron. Igas for doloron!

*Ho mia kor'*

*el mia brusto nun ne saltu for  
 ne batu, mia kor', maltrankvile  
 jam teni min ne povas mi facile  
 Ho, mia kor'!*

Ne saltu el la brusto, antaŭ ol revidi ŝin  
 Mi petegas kompateme donu min  
 Lastan ŝancon! Lastan dancon!  
 Ĉu perdita jam la Paradizo?  
 Ĉu mia amo, mia sento, mia varmo, sentimento jam  
 trafita de la paralizo?  
 Ĉu la esperoj estas nun for?  
 Ĉu restas sole dezerto, deliro, deziro ĉe l' kor'?  
 Ne plu vinbotelo? Ne plu ampromesoj sub helo de l'  
 stelo?  
 Ne plu brakumo? Ne plu parfumo?  
 Ne plu senti la odoron ŝian? Ne plu, mia kor',  
 rigardon alian?  
 Ne plu la promenado sur la sablo fajna, tuŝo,  
 ardaĵ kisoj, revo tutsemajna?  
 Ne permesu, ho, fatala destin',  
 Ke nia amo poreterna alvenu al la fin'.  
 La mano kiu, iam, varme karesis  
 Hodiaŭ, bedaŭrinde, jam larme forgesis  
 Forgesis ĉion, forgesis la kolorajn tempojn, forgesis  
 harmonion!  
 Ĉu tarda?  
 Ĉu denove la pasio intensa, ĉiam viva, ĉiam febra,  
 ĉiam arda?  
 Denove kuri? Amajn vortojn flustri, susuri?  
 Ĉu denove esti kune sub pluvo torenta?  
 Torenta guto, torenta vetero. Unu ombrelo.  
 Pluvo da volo. Pluvo da kisoj. Tenero?  
 Mi sopiras, esperas ke denove mi kaj ŝi  
 Resumu nian vivon en du literoj "Ni".  
 Ni, por ĉiam. Ni, nur...  
 Ni, dum tuta vivo. Ni, plezur'...

*Ho mia kor'*

*el mia brusto nun ne saltu for  
 ne batu, mia kor', maltrankvile  
 jam teni min ne povas mi facile  
 Ho, mia kor'*

## KANTU, KANTU, KANTU KARA

Teksto: Tone

La mondo estas plena de trezoroj, mirindaĵoj  
Kelkfoje, pro la rapideco de la vivo, ni forgesas  
pri tiom da belaĵoj  
Ĉimomente, ni malfermu niajn okulojn por rigardi  
la vivon kiel infanoj  
Ni rigardu ĝin kolorplene, ni rigardu ĝin fantaste,  
ni rigardu ĝin emocie  
Kaj ni kantu!!!  
Ni kantu pri ĉiuj aferoj kantindaj,  
Ĉiuj aferoj kantendaj, kanteblaj  
Pli ol ĉio en la vivo, miaj karaj  
Ni kantu!!!

Mi volas kanti pri la granda tutmonda homa  
familio  
kanti pri tribaro, kanti pri klano, gento, pri  
prageneracio  
pri planedo, vulkano, rivero, duno, oazo  
pri la universo, flaŭro, faŭno, sezonoj de la jaro  
admirinda simfonio, grandioza koncerto  
pri leginda kaj utila verko  
pri solidareco, prudento, amo, bono  
karitato, venko, fido, respekto, pardono  
senlaca laboro, unuiĝo de formikoj  
ilia persistemo, decido, organizo  
pri kredo de infano je Sankta Nikolao  
pri la sojlo kaj komenco de nova erao  
pri la ĉarma sorĉistino, la Naturo  
pri Ĉinio kaj la serpentuma muro  
mi volas kanti pri kredo de l' homo je io  
pri komenco de l' vivo, pri ties embrio  
pri la freŝa venteto kiu karesas vizaĝon  
pri la kanto de la birdo, pitoreska pejzaĝo  
apudlaga trankvilo, arbara kvieto  
la infano kiu petolas gaje sur la sabla tero  
pri la plezuro de dormo sub ombro de arbo  
pri la ĝojo de agrabla promenado  
mi volas kanti pri la hejmo, dolĉa hejmo  
pri miraklo de l' sango fluanta tra l' vejno  
kanti pri valo, kanti pri kampo  
kanti pri savano, stepo, kanti pri pampo  
kanti pri la teatro, mondo kie brilas ĉio  
pri la kapablo ĉerpi inspiron el io  
pri la progreso de la mondo, telekomunikado  
portebla telefono, tuttera teksaĵo.

*Kantu, kantu, kantu kara  
kanto estas tre bonfara!!!...*

Mi volas kanti pri floro, parfumo,odoro  
kanti pri konstanta bato de la koro  
pri profunda dolĉa penso disfluganta libere  
iranta superĉio, sentime, sen pago, senĉese  
kanti pri la ĉarma cigno kiu naĝas gracie  
popola interamikiĝo trans la limo, internacie  
pri la ŝerco, amuzo, distro, gajo kaj grimaco  
la ridiga kapablo kaj vogleco de pajaco  
kanti pri vespera kaj matena krepusko  
pri kaskado, akvofalo, pri bona ekskurso  
invento de vaporŝipo kaj lokomotivo,  
kaj pri la mirinda arkeologia surprizo  
mi volas kanti pri la daŭra sunradio  
pri sporto, botaniko, kaj kulturo, ekologio  
kanti pri plantoj, pri la glora ĉielo  
pri laboro de abelo preparanta mielon  
pri ritmo dancinstiga, pri murmuro de l' maro  
pri atolo, aŭroro kaj pri majesta montaro  
pri lingvo internacia, ĝia ekzisto  
kanti pri feino, kanti pri Volapukisto.

*Kantu, kantu, kantu kara  
kanto estas tre bonfara!!!...*

Mi volas kanti pri la brila kaj matena stelo  
kiu tago post tago simbolas esperon  
arkitekturo, pikturo, skulpturo, poezio  
danco kaj muziko, kaj pri grandega emocio  
pri ĉiuj artoj celantaj la belon  
pri anima etoso, estimo kaj konsidero  
pri nimfo de la maro, rivero, fonto, arbaro  
plenkora donaco, pri sovaĝa bubalo  
kanti pri reamikiĝo, ĝojo kaj konkero  
pacienco, toleremo, kanti pri fidelo  
pri ĝuo de feliĉo, neforgesebla momento  
pri dolĉa rememoro, pri necesa silento.

*Kantu, kantu, kantu kara  
kanto estas tre bonfara!!!...*

## HORO POR LA KORO

Teksto: Tone

Por paco vere regi en la mondo  
ne necesas ĵeti sur kapojn, bombojn  
ĉar oni ne akiras pacon per tondrado de kanonoj  
milita tanko, fusilo aŭ morto de milionoj, da  
homoj  
necesas atomnuklea armado, impona arsenalo  
revolvero, pistolo, karabeno, mitralo  
aŭ per ploro de infano orfa, vidvino aflikta  
kaj filoj de la sorto, bebo ne naskita  
time trema koro, kaj murdo, turmento  
vekrio, malĝojo, agreso, malkontento.  
Ĉu tio do la vivo? post miloj da jaroj nur deklivo?  
Ne! Mi ne volas, decide, kredi ke  
la homoj sin malamas, sin detruas  
kaj ke, ankoraŭ, en koro, milito forte bruas.  
Ĉu ne estas pli facile ĵeti en korojn iom da espero  
ol sin armi per kolero?  
Ho, Maro! Infana raso. Raso infana.  
mi volas vin, humana, sana  
pro tio mi petegas ke...

*Permesu ke ekfloru, en la koro, la espero.  
ke la tuta mondo kantu kanton kun sincero  
la vivo estu ĝojo, estu utilo, estu graco  
nur regu paco.*

*“Paĉjo, kiom longe atendi? Kiam paco? Ĉu vi  
scias?”*

Demandis min, filino mia...  
Mi silentis. Fajron interne, mi forte sentis.  
Tiuj vortoj ŝiris mian koron.  
Doloro. Ploro.

Ĉu estos tempo por rikolto, tempo por floro?  
Ĉu estos tempo por ke la suno denove brilu  
Kaj blovo de la gaja vento super ni karese iru...  
Kaj la freŝa, luma tago denove sin montru antaŭ  
nia vido  
Kaj la mondo estu nur sub paca egido? Kaj sen  
divido?  
En Imperio de Nenio, Ambicio  
Ĉu denove kreskos, rozo kaj lilio?  
*Jes. KREDU JA!*  
Ne poreterne daŭras iu milito

Ne poreterne tragedio, katastrofo, fatalo  
Doloro, ploro...ĉar paco estas nia idealo.  
Ne plu batalo. Ne plu Hiroŝimo, ne plu Nagasako  
Ne plu furioza kaj senĉesa detruado...  
Ne plu negativa, malkomprena rilatado  
Futuro neklara. Estu temerara! Persvadu!  
Provu revii. Provu songi por pli justa mondo  
Venko! Jen la respondo!  
Mi senĉese ripetas. Mi insiste petas al Homaro  
ke...

*Permesu ke ekfloru, en la koro, la espero.  
ke la tuta mondo kantu kanton kun sincero  
la vivo estu ĝojo, estu utilo, estu graco  
nur regu paco!*

Du miljaroj jam pasis kaj oni esperas ke  
la homaro konsciiĝu, kontraŭe, Ve!  
estas tempo por la fino de larmo  
en ĉiuj lokoj disiĝu frata varmo  
La homoj devas unuiĝi, forigi malamon  
por la vivo fari konstantan batalon  
kunvokandon al feliĉo, riĉo  
al paco konstanta, senlaca dediĉo.  
Homaro vekigu, donu ŝanĉon al la paco  
kredu je la savo de la homa raso  
Ne blindigu! Realas la danĝero.  
Estu paco inter la homoj sur la tero.  
Ne gravas kredo, haŭtkoloro, raso  
nek gravas socia klaso  
gravas nur vivi en harmonio  
kiel unu sola vera homa familio!  
Ne plu doloro, ploro. Estas horo por la koro.  
Ne plu doloro, ploro. Estas horo por la koro.

*Permesu ke ekfloru, en la koro, la espero.  
ke la tuta mondo kantu kanton kun sincero  
la vivo estu ĝojo, estu utilo, estu graco  
nur regu paco.*

*Ne plu doloro, ploro. Estas horo por la koro.*

Nova tago! La suno brilas en la altoj.  
Nova ŝanco subite sin montras ĉe ni.  
Antaŭ niaj okuloj...Radioj diafanaj. Ne nebuloj.  
Afabla peto de naturo al kresko konstanta.  
Akceptu! Vi estas pli ol io ajn. Ne simpla ŝajn'.  
Ne simpla elemento.  
Efektive kredu je via kompetento.  
Kredu je via kapablo, kredu je via talento.  
Eniru en la arenon. *Kaj la armiloj?* Ne necesas.  
Estas vi gladiatoro, kun glavo sen klingo  
Estas vi plena de valoro, kun gravo, atingo...Povo!  
Per anima movo, vi ŝovas, vi puŝas, vi ĵetas  
Balancas, vi levas, skuas...Kaj vi konstruas...  
Transiru la Rubikonon!!!  
Al la preterito... Nur pardonon! Adiaŭ!  
Ĉar la estonto nur dependas de hodiaŭ  
Hieraŭ iris...Hieraŭ pasis  
Forgesu do! Tempo ĝin frakasis...  
La vivo estas nun. Atentu bone  
Ni analizu kune. Repe, ritme, sone...  
De la vivo, estu vi aŭtoro;  
De la vivo, estu vi, la reĝisoro...  
La artan zorgon de la vivo, konfidu al vi...  
La stilon kaj kadencan, difinu ankaŭ vi.  
Estas vi kiu respondecas por via apoteozo  
Estas vi kiu aprecas la valoron de la rozo  
Ne for de vi la sperto, plenumi, fari  
Ke vi estas tre valora, la momento estas deklari  
Neniu povas vin bari!!!  
Ne atendu! Agu kiel la kelnero  
Ĉar la vivo estas ĉiam, ne ricevo sed ofero  
Venas tuj, venas rapide, evoluo kaj prospero  
Estu vi ĉefa rolulo kaj ne simpla pasaĝero  
Jen per mildo, jen per koro, estos formo de  
konkero.

*Meti flanken malestimon, malĝojon, malesperon*  
*Meti flanken, miskomprenon, malkuraĝon,*  
*suferon...*

Meti flanken malestimon. Paŝo unua  
Memrespekto kaj alies. Decido kongrua  
Estimi, konsideri, ŝati, honori  
Serĉi kaj aspiri, celi, esplori...  
Esplori en ĉiuj... bonajn farojn  
Esplori en ĉiuj... valorajn agojn.  
Valoron, jes, ĉiu homo havas  
Ĉiuj en la vivo, kompreneble, gravas...  
Valoron de la varo taksu mone, sume, ore  
Valoron de l'homaro taksu bone, lume, kore

Ĉar... valoras ni tiom kiom ni valorigas  
Ke la respekto kaj akcepto estu tio kio nin vere  
ligas...  
Se ni estas kune por... ni... malĝojon igu for  
De la menso. De ni. De la kor'  
Venigu vivan plezuron, venigu vivan kontenton  
Ke nia entuziasmo kontaĝu ĉiujn gentojn  
Kontaĝu ĉiujn plezure. Kontaĝu tutenature.  
Kontaĝu, jes, senmezure...Ĉiam kune!!!...  
Ĉiam kune, ankaŭ ni forigu, la malesperon  
Ke fido, kredo kaj deziro, disiĝu en la teron.  
Kion ni aspiras, plenumiĝu!!!  
Kion ni celas, fakte, efektiviĝu!!!  
Kion ni sopiras, okazu tiel same.  
Okazu, prete, konkrete, rapide, fulme kaj tondre.  
Alia paŝo al la venko  
Estas kompreniĝado  
De perfekteco, la plej alta grado.  
Agi tolereme, ne kontraŭstari preme  
Se oni ne aprobas se al ni ne plaĉas  
Se estas ĝena, suferiga, se la afero aĉas  
Vera evoluo: akcepti  
Tio montras ke oni scias, ja respekti.  
Ni estu kuraĝaj antaŭ vivdefioj  
Ni ne perdu memregadon  
Je kontraŭaj opinioj  
Trankvile, energie, agi antaŭ la ofendo  
La firmeco de la koro: ŝildo kaj defendo  
Esti kuraĝa, esti brava, esti aŭdaca  
Esti konstanta, kaj persista, obstina, kaj sagaca.  
Esti, jes. Estu Ni. Estu Ni mem...  
Antaŭ ĝuo, antaŭ ĝojo, antaŭ la problem'  
Esti ni sendepende de la situci'  
Ĉu kompleza, ĉu favora  
Ĉu amara, ĉu dolara...Esti ni...  
Esti neŝancelebla antaŭ la sufero  
Malkuraĝo, miskompreno, malestimo, malespero  
Ke ni estas kompetentaj, tio estas pura vero  
Sufiĉas ke al evoluo, ĉiam estu adhero  
Nia koro estu plena de decido kun sincero  
Helpi ĉiam sendistinge, estu ja nia konkero  
En la mondo, ie ajn, pensu ĉiam pri tolero  
Ĉar ankoraŭ sen respondo: Vivo, tre dolĉa  
mistero.

*Meti flanken malestimon, malĝojon, malesperon*  
*Meti flanken, miskomprenon, malkuraĝon,*  
*suferon...*

## *DANCU KUNE! DANCU PLU!*

*Teksto: Tone*

---

---

*Ni dancu laŭ sono de la vivo!!!*

Laŭ la sono de la vivo  
venu nun, al vera aktivo  
demetu la maskon, demetu la vualon  
venu koni, venu ĝui kun mi, novan realon!  
En intensa bluo, koloras la ĉielo  
dancas planedoj, kometoj, steloj... Kaj ni?  
Ĉu danci aŭ ne danci? Jen la demando.  
por la korpo estas plezuro de unua granda.  
La korpo necesas, la korpo ne mensogas  
per danco kompreneble, la korpo dialogas kaj  
ridas, movon ĝi avidas.  
Korpo petas; kvazaŭ dekretas, tion mi ripetas  
mi scias ke vi petas.  
Se vi pretas, se vi pretas venu do!  
nun estas la hor'. Ĉar...  
La vivo, mia kara, estas movo, energio  
danco, mi diras, jen la terapio  
por alporti ridon, ĝojigi la intimon  
ke la impeto de la danco, do, forigu limon.  
forigu ĉian baron, forigu la malĝojon,  
alportu ĝi plezuron kaj montru al ni la vojon  
de kontentiga sento, distro gajo, pura ĝu'.  
dancu, jes, senĉese, dancu sen tabu'.  
Eksteriĝu ĉimomente, via dancpovo  
eniru en vian koron la sono de la ĝojo  
dancadu stimulu ne nur korpon ankaŭ menson.  
ke danco kaj muziko ekscitu la sensojn.  
Ni balanciĝu per ritma onda movo  
kiel lulas ŝoson milda venta blovo.

*Dancu kune...Dancu plu!!!*

Laŭtakte de tiu sono vian korpon balancu  
kun emocia fervoro kaj simpatio dancu  
akompanu nin al tiu reva vojaĝo  
tute ne malhelpas kompreneble via aĝo.  
Se ne plu eblas per la korpo  
dancu per la menso  
ne gravas kvanto, gravas la intenco  
dancu de ĝojo, la koro en la brusto  
dancu folioj sur branĉo de arbusto.

*Dancu kune...Dancu plu!!!*

Tutajn tagojn de la jaro, ni dancu kune  
somere, printempe, vintre, aŭtune  
ni dancu kune ĉar la horoj flugas for  
ni dancu kune dum ni sentas la baton de la kor'  
la flamon de la vivo, tiu eterna danco  
la momento unikas, jen la ŝanco  
movi kruojn, movi brakojn,

fari simplan dancopaŝon  
dancu iel ajn, oni ne permesas kaŝon.  
Oni ne permesas resti en la sama pozicio  
for de tie ĉi la stagno, inercio  
eĉ la tero konstante rivoluas  
esti aktiva al ĉio kontribuas.

*Dancu kune...Dancu plu!!!*

Danci kune, danci plu  
kuracilo kontraŭ tedi kaj kontraŭ enu'  
la etoso estas agrabla, estas ĝi inspira  
venu ja sentime, la momento estas delira.  
*Venu danci... Danci kune!*  
*Venu danci... Danci plu!*  
Facilas la danco se la feliĉo kantas  
estu feliĉo partnero konstanta  
se feliĉo estas nun la partnero  
kun dediĉo estas nun  
la momento de supero. Do!!!  
altiĝu en la aeron, levu sin for de la tero  
dancu flanken, dancu salte  
dancu kune kaj senhalte!

*Dancu kune...Dancu plu!!!*

Laŭ la sono de agogo kaj ankaŭ de tamburino  
dancas avo, dancas patro, nepo, filo kaj patrino  
sonas klare kaj tremante  
sonas bele la tintiloj  
movas min, movas vin,  
movas dekojn, movas milojn  
estas la muziko svinga  
estas ĝi ja danciga  
venu do, danci en la balo  
movi korpon, la kialo  
dancu vige, entuziasme  
kun fervoro, dancu arde  
dancu lerte, dancu sperte  
kun talento dancu arte  
dancu sole, dancu grupe  
dancu kun li aŭ kun mi  
dancu vice, dancu ronde  
kaj ne ĉesu dancu pli.

*Dancu kune...Dancu plu!!!*

Dancu vi el Eŭropo, dancu vi el Ameriko  
dancu vi el Azio, Oceanio kaj Afriko.  
Dancu vige, entuziasme, kun fervoro, dancu arde  
Dancu lerte, dancu sperte, kun talento dancu arte  
Dancu sole, dancu grupe, dancu kun li aŭ kun mi  
Dancu vice, dancu ronde, kaj ne ĉesu dancu pli.